

## ESZPERANTÓ C1 MINTAFELADATSOR

### I. Olvasáskészség

#### Olvasáskészség 1

Maximális pontszám: 20

#### Hopijaj indianoj kaj maizo

Por Hopioj\*, indiana gento loĝanta de pli ol 1000 jaroj en la nordo de sud-usona ŝtato Arizono, maizo estas ne nur baza ĉiutaga manĝaĵo, sed ankaŭ trezora donaco, heredigita al ili de Patrino-Tero kaj pro tio simbolo de la vivo mem.

Kiam aperas la lasta maizrikolto de la somero la hopijaj familioj bakas multe da sukermaizospikoj kaj ilin ankoraŭ surspike sekigas, por uzi ilin dum la longaj venontaj monatoj. Sciencaj eksperimentoj komprenigas ke, pli bone kaj pli efike ol alimaniere sekigita maizo, la hopia bakita maizo konservas valorajn mineralojn kaj vitaminojn. La hopia maizo konserviĝas prefere surspike dumvintre pro la kialo, ke malamikaj insektoj pli facile invadas provizojn de elspikigitaj maizograjnoj ol tiujn restintajn surspike.

Dum la viroj laboras en la kampoj aŭ sekigas la kolektitan maizon sur la domtegmentoj (necesas ofte turni la maizon por ke ĝi bone kaj egale sekiĝu), la virinoj plenumas aliajn primaizajn taskojn. Ili devas eligi la malnovan ankoraŭ neuzitan maizon el ĉiuj konservujoj por purigi tiujn lastajn kaj ilin ŝmiri per gipso antaŭ ol tien enigi la novan maizrikolton. Post plenigo de la konservujoj per la nova rikolto la virinoj aldonas supre la restaĵojn de la malnova rikolto celante eluzi ilin antaŭ ol komenci uzi la novan provizon.

Pro tio ke, en la tradicia kuirreceptaro multegas maizmanĝaĵoj, la hopiinoj devas disponi pri konstanta kaj abunda provizo de maizfaruno. Kutime ili mem ĉiutage dum longaj horoj permane mueladas maizgrajnojn, uzante paron da muelŝtonoj tiom valoraj kaj tiom alttaksataj, ke oni heredigas ilin de generacio al generacio.

La unua ŝtono ('manŝtono') estas cilindroforma kaj pugnodimensia. Oni tenas ĝin en la mano kaj frotadas sub ĝia malsupra ekstremajo la muelotan maizon. La dua ŝtono ('kontraŭŝtono') estas longa, plata, tabulsimila ŝtono havanta meze de ĝia supraĵo malprofundan kavon, en kiun oni metas la maizon kaj kontraŭ kiu oni frotigas la manŝtonon, tiel pulvorigante la intere kuŝantajn grajnojn. La kontraŭŝtono staras ĝenerale surgrunde kaj la muelantino kaŭras surgenue antaŭ ĝi por efektiviĝi la malfacilan mueladon.

Kutime en hopijaj domoj tri diversaj kontraŭŝtonoj apude viciĝas: unua ŝtono por fajna faruno, dua por mezfajna faruno, kaj tria por preskaŭ kruda faruno. Avinoj komencas instrui al siaj nepinoj ekde la plej juna aĝo la scipovon farunigi maizon, por ke ili bone kaj taŭge kaj senhelpe mueladu okaze de iliaj seksmaturecaj ceremonioj kaj, por ke ili poste fariĝu bonegaj edzinoj kaj patrinoj.

Ne malofte maizmuelado fariĝas socia evento okaze de kiu pluraj knabinoj kunvenas por mueladi samtempe kaj samritme dum avo aŭ onklo kantas ritmajn folklorajn kanto-rakontojn. Kelkfoje apud la knabina laborejo troviĝas eta fenestro tra kiu kuraĝa amunto kapablas amindumi ŝatatan muelantinon dum ŝi laboras. Se plaĉas al ŝi la ampretendanto, ŝi konsentas iom babiladi kun li, sed se li malplaĉas, ŝi vidigas sian malaprobton ĵetante maizfarunon kontraŭ lin.

Ofte oni konstruas super la muelad-areo bretojn, sur kiuj oni konservas en korboj aŭ potoj la jam muelitan maizon. Kiam hopijaj familioj serĉas edzinkandidaton por ŝatata filo, ili ne forgesas juĝi la estontan laborvaloron de la knabino laŭ la kvanto de la surbrete konservita maizfaruno, pri kiu ŝi persone kaj propramane respondecas.

Hodiaŭ la situacio multe ŝanĝiĝas pro la komercaj kuiriloj kaj kuirprovizoj, kiuj tiom facile aĉeteblas kaj uzeblas. Flavan jam muelitan maizfarunon ekzemple Hopioj povas aĉeti ĉe sur- kaj eksterrezervejaj mangajvendejoj. Aliajn maizojn oni povas facile mueladi hejme per elektraj mueliloj kaj mangajmiksiloj. Tamen la Hopiinoj ankoraŭ preferas manmueladi, per manŝtono kaj kontraŭŝtono, siajn proprajn blankan kaj bluan maizojn. Plurjarcentaj duonreligiaj kuirtradicioj ne facile anstataŭiĝas sur la tablomontoj de norda Arizono, kie de generacioj staras la ŝton-kaj-adobaj tavoloj de la hopia gento.

*Hopioj\* - hopik, Dél-Amerikában élő indián népcsoport*

1. **Hogyan konzerválják a hopik a kukoricát?** 3 pont
2. **Mi az előnye ennek a tárolási módnak?** 2 pont
3. **Hová kerül aratás után a tavalyi kukorica és miért?** 4 pont
4. **Mit tudunk meg a kukorica őrléséhez használt második kőről?** 4 pont
5. **Hogyan történik az udvarlás kukoricaőrlés közben?** 4 pont
6. **Mi változott és mi maradt meg a házi őrlés hagyományából?** 3 pont



## MEGOLDÁS:

- 1. Hogyan konzerválják a hopik a kukoricát?** **3 pont**
1. megsütik
  2. szárítják
  3. a kalászt/ a kalászon
- 2. Mi az előnye ennek a tárolási módnak?** **2 pont**
4. megőrzi az ásványi anyagokat, vitaminokat
  5. a kártevők kevésbé tudnak hozzáférni
- 3. Hová kerül aratás után a tavalyi kukorica és miért?** **4 pont**
6. kiszedik a tároló edényekből,
  7. hogy azokat megtisztítsák
  8. az edény tetejére kerül,
  9. hogy azt használják fel előbb
- 4. Mit tudunk meg a kukorica őrléséhez használt második kőről?** **4 pont**
10. ellen-kőnek is nevezik
  11. hosszú, lapos
  12. táblaszerű kő
  13. közepén sekély/kis mélyedéssel (a kukoricának)
- 5. Hogyan történik az udvarlás kukoricaőrlés közben?** **4 pont**
14. a lányok munkahelyén/ ahol összejönnek őrölni
  15. van egy kis ablak, itt udvarolhat a fiú
  16. ha a lánynak tetszik, az udvarló beszélget vele
  17. ha nem tetszik neki, lisztet szór az udvarlóra
- 6. Mi változott és mi maradt meg a házi őrlés hagyományából?** **3 pont**
18. a sárga kukoricaliszt készen kapható a boltokban
  19. elektromos gépekkel is lehet őrölni otthon
  20. kézzel őrlik még a fehér és kék kukoricát



**Olvassa el a hiányos szöveget figyelmesen, majd egészítse ki értelemszerűen a szöveg alatt található szavakkal / szóösszetételekkel! A megfelelő szó / szóösszetétel betűjelét írja a lap alján található táblázatba a számok alá! Felhívjuk figyelmét, hogy 2 betű fölösleges.**

En la sidejo de la Eŭropa Komisiono oni solenis la lingvotagon \_\_\_0\_\_\_ pri „la neceso lerni kaj praktiki fremdajn lingvojn en Eŭropa Unio”. Oni prezentis la „plej multlingvajn tradukistojn” de la Komisiono, interalie la grekon *Ioannis Ikonomou*, \_\_\_1\_\_\_.

Ĉeestis la konferencon ankaŭ *Seán Ó Riain*, \_\_\_2\_\_\_ rakonti al la ĵurnalistoj pri la ambicia esperantista projekto Lingvolanĉilo, \_\_\_3\_\_\_ por enkonduki infanojn al studado de fremdaj lingvoj. Jen lia resumo:

„Mi estis inter la kvar tiel-nomataj „poliglotoj”, kiuj estis invititaj de la Komisiono prezentiĝi, \_\_\_4\_\_\_ kaj povas traduki el aliaj ses. Pro tio, mi havis la okazon plurfoje mencii Esperanton. Ekzemple, la Ĝenerala Direktoro de la traduk-sekcio de EU, sinjoro *Lönnroth*, demandis al ni \_\_\_5\_\_\_. Ni parolis pri la pola kaj pri Esperanto.”

Anticipante la lingvotagon, la Eŭropa Komisiono eldonis 15-paĝan dokumenton pri multlingveco kiel „rimedo por Eŭropo kaj komuna sindevigo”. Jam en la lingvotago, la 26-an de septembro, la respondeca komisionano *Leonard Orban* partoprenis forumon \_\_\_6\_\_\_ en Francio. Dum la forumo oni diskutis pri la agado de la EU-ŝtatoj \_\_\_7\_\_\_. Centra temo de la forumo estis la „pozitiva influo de multlingveco al evoluo, kresko kaj sento de komuneco”.

La oficiala celo de la Eŭropa Tago de Lingvoj estas atentigi la ĝeneralan publikon \_\_\_8\_\_\_, konsciigi ĝin pri la ekzisto kaj valoro de ĉiuj lingvoj parolataj en Eŭropo kaj aldone \_\_\_9\_\_\_. Tamen mankas daŭre en la oficialaj strukturoj de la Eŭropa Unio komuna opinio pri tio, \_\_\_10\_\_\_.

- A) ĉar mi parolas sufiĉe flue ok lingvojn
- B) kiu celas uzi Esperanton
- C) kiu estis la plej malfacila kaj la plej facila lingvo, kiujn ni lernis
- D) kiu kaptis la okazon
- E) kiu parolas 32 lingvojn
- F) kiujn lingvojn lernu eŭropanoj
- G) kiu taŭgas por internacia komunikado
- ~~H) per gazetara konferencoj~~
- I) popularigi la tutvivan lingvolernadon
- J) pri la graveco de lingvolernado
- K) pri multlingveco en la universitato *Sorbonne*
- L) por plibonigi la lingvoscion de la civitanoj
- M) pro instruado de fremdaj lingvoj

<b>0</b>	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
<b>H</b>										



**MEGOLDÁS:**

<b><i>0</i></b>	<b>1</b>	<b>2</b>	<b>3</b>	<b>4</b>	<b>5</b>	<b>6</b>	<b>7</b>	<b>8</b>	<b>9</b>	<b>10</b>
<b><i>H</i></b>	<b>E</b>	<b>D</b>	<b>B</b>	<b>A</b>	<b>C</b>	<b>K</b>	<b>L</b>	<b>J</b>	<b>I</b>	<b>F</b>



## II. Íráskészség

### Íráskészség 1

Maximális pontszám: 20

*Írja le gondolatait idegen nyelven az egyik témáról úgy, hogy minden irányítási szempontra térjen ki! (Az irányítási szempontok sorrendjét nem kell betartania.) Fontos, hogy összefüggő szöveget hozzon létre. Tartsa be a levél formai előírásait (dátum, megszólítás, üdvözlő formula, aláírás)!*

*Terjedelem: 20-22 sor*

*Kérjük, hogy a feladat megoldása során – a titkos adatkezelés érdekében – ne használja saját adatait!*

#### I.

Egyik barátja/barátnője nemrég plasztikai műtéten esett át: megoperáltatta az orrát, mert túl nagy-nak találta. Azóta sokkal jobban érzi magát a bőrében, valósággal kivirult. Ön nem érti igazán a döntését, úgy véli, hogy egyáltalán nem lett volna szükség erre a beavatkozásra. Most levélben számol be a történekről külföldi ismerősének.

- Jelzi, hogy mi készítette Önt a levélírássra, és elmeséli az esetet.
- Felidézi, hogy mivel indokolta az illető a döntését.
- Elmeséli, hogyan fogadta a környezete, amikor megjelent az új arcával.
- Leírja, mit szólna az Ön családja, baráti köre, ha megváltoztatná a külsejét.
- Kifejti véleményét a manapság tapasztalható "szépségkultuszról".

Vagy:

#### II.

A TV5 műsorán látott egy riportot, amely a fiatalok körében tapasztalható erőszakról szólt. A jelenség napjainkban egyre aggasztóbb méreteket ölt, különösen a nagyvárosok külterületein. A riport végén a műsorvezető megadta az adás címét, arra kérve a tévénézőket, hogy írják meg a témával kapcsolatos véleményüket. Ön most levelet ír a műsor szerkesztőségének.

- Utal az Ön által látott adásra, annak tartalmára.
- Leírja, hogy Ön szerint mivel magyarázható az erőszak terjedése, milyen megnyilvánulásai vannak, kik az elkövetők, kik az áldozatok.
- Elmesél egy olyan esetet, amikor közvetlenül szembesült az erőszakkal.
- Megírja, hogy véleménye szerint hogyan lehetne megoldani ezt a problémát.
- Javasol a szerkesztőségnek egy másik égető témát, amellyel érdemes lenne foglalkoznia.



## MEGOLDÁS

## I.

Kara Suzana!

Mi havas tre interesan novaĵon por vi. Imagu, nia komuna amikino Tamara farigis beligan operacion! Vi ne povos rekoni ŝin. Nun ŝi havas pli malgrandan nazon kaj pli grandan buŝon. Vi certe memoras pri tio, ke ŝi longe vivis sola, kaj ŝi jam tre deziris ekhavi fianĉon aŭ almenaŭ amikon. Ŝi pensis, ke ŝi ne sukcesas trovi vivkunulon pro sia aspekto.

Ni, en la universitato ege ŝokiĝis pro ŝia nova aspekto. Mi ne pensas, ke nun ŝi estas pli bela, mi dirus, ke ŝi estas alia.

Imagu kion dirus mia familio kaj miaj geamikoj, se mi agus simile. Mia patro certe kolerus, kaj mia edzo eble eĉ forlasus min. Ne parolante pri la kosto de tiuspecaj operacioj.

Laŭ mia opinio la hodiaŭ spertebla "beleco-kulto" estas falsa afero. Ni, povraj virinoj devas ĉiam pensi pri nia pezo kaj frizaĵo. Samtempe la enviaj belulinoj suferas pro sia dieto kaj ekstrema maldikeco. Mi scias, ke mi neniam aperos sur titolpaĝo de modgazeto, sed almenaŭ mi povas manĝi kiam ajn pecon da ĉokolado. Tamen mi ofte havas konscienciproĉon pro tio. Laŭ mi estus pli bone se la manekenoj estus normalpezaj, normalaspektaj virinoj. Tiam mi ne devus senti min dika. Kion vi pensas pri tiu temo? Mi esperas, ke vi estas kontenta pri via aspekto.

Atendante novaĵojn pri vi, salutas vin:

Monika

Budapeŝto, la 16an de marto, 2007

Vagy:

## II.

Estimata sinjoro!

Mi skribas al vi pro la programo prezentita la 2an de januaro en la kanalo TV5. Temis pri la perforto, kiu pli kaj pli disvastiĝas inter gejunuloj.

Laŭ mi la fenomenon kaŭzas la perfortoplenaj televidprogramoj kaj videoludoj. La hodiaŭaj gejunuloj verŝajne simple enuas kaj pro la manko de sekvinda modelo ili agas kiel la herooj en la falsa mondo de la filmoj. Mi aŭdis, ke la perforto disvastiĝas jam ankaŭ en la lernejoj. La pli grandaj geknaboj forprenas de la malfortaj ne nur iliajn manĝaĵojn, sed ankaŭ la porteblan telefonon aŭ pli valorajn vestaĵpecojn.

Mia filo estis atakita jam en la infanvartejo. Verŝajne pro iu ludilo. Imagu, knabineto mordis lin. Li ekhavis sangantan vundon.

Mi eĉ imagi ne povas kiel eblas eviti tiajn konfliktojn. Certe mi ne donos al mia filo enviindajn kaj valorajn objektojn. Mi ŝatus se mia filo ellernus ian defendosporton, ke li estu la pli forta en kazo de atako. Por pli bone kompreni la vidpunkton de la agresantoj necesus konsulti psikologojn kaj ellabori edukprogramon por la lernejoj. Necesas interesaj agadeblecoj por la gejunuloj, por ke ili estu malpli impresataj kaj dependaj de la televido.

Alia grava problemo estas la surstrata sekureco. Ĉu oni povas lasi siajn infanojn sole trafiki en la grandurboj?

Mi ĝojus vidi pri tiu temo programon.

Mi dankas vian atenton.

Sincere salutas vin:

Sabina Horváth

Budapeŝto, la 10an de januaro, 2007



*Olvassa el az alábbi állítást, majd fejtse ki a véleményét az állításról idegen nyelven 12-15 sor terjedelemben.*

Nuntempe ekzistas ĉirkaŭ 3000 lingvoj. De jaro al jaro mortas etnaj lingvoj. Tio estas grava perdo por la homaro. Kio estas ties kaŭzo? Kiel eblas tion preventi?

### MINTAMEGOLDÁS:

Minoritataj lingvoj estas en danĝero se ili ne estas oficialaj lingvoj de la ŝtato. Se oni rajtas uzi nur la „grandajn” lingvojn en oficejoj kaj lernejoj. Se la ŝtato malpermesas uzadon de etnaj lingvoj en publikaj lokoj. Se la parolantoj de la etna lingvo fine kredas, ke ilia lingvo estas malvalora. Se la gepatroj ne plu instruas sian lingvon al la sekva generacio, ĉar ili deziras integriĝi kaj ne diferenci. Se la gepatroj kredas, ke la infano estos pli sukcesa en la vivo, lerninte nur la lingvon de la ŝtato. Povas okazi, ke la minoritatajn lingvojn oni uzas hejme, sed la gejunuloj ofte translokiĝas por trovi pli bonan laboron kaj ne plu havas kontaktojn kun la komunumo, kiu parolas la endanĝerigantan lingvon.

Gravas, ke ŝtatoj, kie vivas minoritatoj anstataŭ perforta integrado, konsciu pri valoro de diversaj kulturoj, valoro de plurlingveco. Parolantoj de etnaj lingvoj ne hontu pri sia lingvo, sed provu transdoni kaj evoluigi ĝin. Se iun lingvon parolas nur maljunuloj oni devas klopodi transdoni ĝin al la sekvaj generacioj. Oni devus trovi personojn, kiuj notas kulturajn valoraĵojn transportatajn de la lingvo: fabelojn, popolkantojn, poemojn.



### III. Közvetítés

#### Közvetítés 1

Maximális pontszám: 15

***Foglalja össze az alábbi szöveget idegen nyelven – a megadott szempontok alapján – 8-10 sorban úgy, hogy összefüggő szöveget hozzon létre!***

#### London reneszánsza

Addig-addig ismételték tekintélyes külföldi újságok, hogy "London a világ legklasszabb városa", mígnem a metropolis lakói is lassan kezdik elhinni, hogy mindez igaz. És persze izgalomba jött a turizmus fellendítéséért felelős londoni idegenforgalmi tanács is, amely igyekszik minél jobban meglovagolni a nemzetközi hírverés keltette érdeklődést.

Becslések szerint 1997 és az ezredforduló között 4 milliárd fontot investálnak Londonban csak a tágran értelmezett szórakoztatásba. A harmadik évében járó nemzeti lottó bevételeiből 28 %-ot fordítanak nemes, kulturális célokra, ami soha nem álmodott lehetőségeket villantott fel a műemlékvédelem, az építészet, a sport területén.

London az utóbbi években a világ egyik gasztronómiai központjává küzdötte fel magát. A jó étvágyú londoniak, akik a kulináris gyönyörök oltárán évi 17 milliárd fontot áldoznak, a bőség zavarával küszködnek. A gourmand-ok bibliája, a francia Michelin Kalauz lassan több londoni, mint párizsi étteremnek szavaz bizalmat, s Londonban ma már száz ország konyhaművészete képviselteti magát. Az éjszakai élet fellendüléséhez nagyban hozzájárult, hogy míg korábban a szigorú hatósági engedélyek miatt hétköznap este 11, vasárnap pedig már 10 óra után még egy pohár sörhöz is nehezen jutott hozzá a szomjas turista, mára jórészt feloldották ezeket a szigorításokat.

A város reneszánsza persze nemcsak kereskedelmi jellegű. London közismerten gazdag kulturális ajánlatában egy-egy este tucatszám is több komolyzenei koncert, két opera, csak a West Enden több mint negyven színházi előadás szerepel.

Nem volnának azonban önmagukhoz hűek a britek, ha nem rombolnák le számos újságcikkben a külföldi sajtó keltette illúziókat. Az Evening Standard például azzal riogat, hogy hasonlóan a hatvanas évekhez, a divatosságot ezúttal is "szörnyű másnaposság" követi majd. A cikk kíméletlenül sorolja a kellemetlenségeket, a forgalmi káoszt, a metróhálózat megbízhatatlanságát, a múzeumok zsúfoltságát, amelyek megoldása sokkal fontosabb lenne, mint a turizmusba való befektetések.

Forrás: HVG, 1997. ápr. 26.

1. Hogyan vélekednek Londonról a külföldi újságok?
2. Kik és mennyit áldoztak a turizmus és kultúra fejlesztésére?
3. Milyen változások történtek a gasztronómia területén?
4. Milyen kulturális programokból választhatunk?
5. Milyen kellemetlenségeket említ a helyi sajtó?





**MINTAMEGOLDÁS:**

Gravaj eksterlandaj gazetoj opinias, ke Londono estas „la plej bonetosa urbo de la mondo”. La londona fremdultrafika komisiono investis ĉirkaŭ 4 miliardojn da fundoj en amuzindustrion, la nacia loterio ofertis 28 procentojn de sia gajno por kulturaj celoj.

Londono fariĝis gastronomia centro, la gvidlibro Michelin proponas pli da londonaj restoracioj ol parizajn. La kuirarto de 100 landoj reprezentas sin en la urbo. La severaj leĝoj pri nokta alkoholkonsumo estas nuligitaj.

Londono estas riĉa je kulturaj programoj: ĉiu vespere ni povas elekti el pluraj koncertoj, operoj, teatraj spektakloj.

Tamen la lokaj gazetoj atentigas pri kelkaj malagrablajoj: trafika kaoso, nefidebleco de la metrosistemo, la troa amaso en muzeoj, kies solvo estus pli grava ol investi en turismon.



***Fordítsa le az alábbi szöveget magyarra!***

Kiam mi fariĝis esperantisto, mi estis junulo kun multe da amikoj en mia familia, profesia kaj hobiaj rondoj. Sed la amikecoj estis supraĵaj, ĉar en la fundo de mia koro mi malkonsentis kun la plimulto de ili. En la Esperanto-klubo en Antverpeno, mi trovis maljunulojn, sed ili lasis al mi agadi laŭplaĉe. Mi fondis junularan grupon, kies regulojn mi difinis, kaj mi ekgvidis kurson sen iu ajn kontrolo de pli sperta instruisto. Mi apenaŭ petis helpon aŭ konsilojn, sed mi ankaŭ ne ricevis klarajn instrukciojn.

La pli aĝaj membroj precipe kontentis, ke mi faras ion. Rerigardante al tiu periodo, mi bedaŭras, ke okazis preskaŭ neniu transdono de la spertoj. Mi elspezis multan energion por refari la erarojn de la antaŭuloj.

Kvankam Esperanto estas komunikilo por eviti miskomprenojn kaj devus konduki al pli da feliĉo, mi rimarkis, ke multaj aktivuloj ĉagreniĝas ĝuste pro sia agado. Kun multaj personoj mi interŝanĝis ideojn pri la eblaj kialoj de seniluziiĝo.

Iom post iom fariĝis klare por mi, ke la ĉefaj fontoj de ĉagreno estas la individualismemo, la nerealaj esperoj, kaj la neadaptiteco al la nuntempo. La aktivuloj devas al kutimiĝi al interkonsiliĝado pri ĉiuj siaj iniciatoj, al interŝanĝo de bonaj kaj malbonaj spertoj, kaj al la akcepto de komune ellaboritaj reguloj.



**MINTAMEGOLDÁS:**

1. Amikor eszperantista lettem, fiatalember voltam, sok barátom volt családom, szakmám és szabadidős tevékenységeim révén. 3p
2. De a barátságok felületesek voltak, mert a szívem mélyén nem értettem egyet a többségükkel. 2p
3. Az antwerpeni Eszperantó Klubban öregeket találtam, de ők hagyták, hogy tetszés szerint ténykedjek. 2p
4. Ifjúsági csoportot alakítottam, amelynek a szabályait én határoztam meg, és elkezdtem tanítani, gyakorlottabb tanár felügyelete nélkül. 3p
5. Alig kértem segítséget, vagy tanácsokat, de nem is kaptam világos instrukciókat. 2p
6. Az idősebb tagok inkább örültek annak, hogy csinálok valamit. 2p
7. Visszatekintve erre az időszakra, sajnálom, hogy szinte semmilyen tapasztalatátadás nem volt. 2p
8. Sok energiám arra ment el, hogy megismételjem elődeim hibáit. 1p
9. Habár az eszperantó olyan kommunikációs eszköz, amely arra szolgál, hogy elkerüljük a félreértéseket, s több emberi boldogsághoz kellene vezetnie, azt vettem észre, hogy sok aktivista éppen a tevékenysége miatt lesz bánatos. 4p
10. Sokakkal folytattam eszmecsere-t az illúzióvesztés lehetséges okairól. 2p
11. Apránként világossá vált számomra, hogy a bánat fő forrása az individualizmusra való hajlam, a valósághoz nem igazodó remények, és az hogy nem alkalmazkodunk a jelen körülményeihez. 4p
12. Az aktivistáknak hozzá kell szokniuk minden kezdeményezésük megbeszéléséhez, jó és rossz tapasztalataik kicseréléséhez, és a közösen kidolgozott szabályok elfogadásához. 3p

